
# BONA ESPERO



Rundbrief für die Freunde, Förderer
und Mitglieder des Fördervereins
"Bona Espero" e. V.

Cirkulero por amikoj, subtenantoj kaj membroj
de la "Subtenanta Asocio de BE" e.V.

n-ro 24 Decembro 1988

Ktoj: Sparda-Bank Münster. BLZ 400 605 60 Kto-nr. 900 826 BONA ESPERO
Postgiro-Amt Dortmund, BLZ 440 100 46 Kto-nr. 2033 99-465

---

Antaŭ mi kuŝas RIDANTAJ INFANOJ por elekti!

14 fotoj estis en la lasta letero de Ursula Grattapaglia. Ĉiuj fotitaj en la 'semajno de la infano'. Tamen, loko estas nur por 3, maksimume 4, .. la lasta ĉijara informilo. Restas la peno elekti. Nepre vi vidu:

Ĉiuj kun aerbalonoj

Pri Josefina kaj la 'famaj kantistoj' Adelino kaj Silvani, pri Jilson kaj Moacir vestitaj kiel indianoj kaj same pri Ursula, Andreo, Junior kaj Noemia gaje kantantaj
vi devas atendi ĝis venontjara marto.

Lachende Kinder, zum Aussuchen

liegen vor mir. 14 Fotos kamen mit dem letzten Brief von Ursula Grattapaglia. Sie wurden alle in der 'Woche des Kindes' gemacht. Aber für höchstens 3 - 4 ist Platz im letzten Info dieses Jahres. So bleibt die Qual der Wahl! Dieses sollen Sie unbedingt sehen:

Alle mit Luftballons

Auf Josefina und die 'berühmten Sänger Adelino und Silvani, auf Jilson und Moacir verkleidet als Indianer und Ursula, Andreo, Junior und Noemia fröhlich singend, müssen wir bis zum kommenden März warten.



Ne forgesu: Venontfoje nepre meti saketon da aerbalonoj en paketon al Bona Espero

Nicht vergessen: In das nächste BE-Paket unbedingt eine Tüte mit Luftballons einpacken.

Keiner hat gemerkt, daß ich den Ball habe, lacht Betania verschmitzt!

Neniu rimarkis, ke mi havas la pilkon, ridas Betania ruzete!



Inter la 52 normalaj estas la '<u>semajno de la infano</u>' eksterordinara. Matene oni iras, kiel kutime, en la lernejon. Sed posttagmeze oni ludas kaj festas, kun aŭ sen najbaraj infanoj. "Ni ankaŭ organizis grandiozan serĉadon de trezoro, kiun Giuseppe inventis en poezia formo. Partoprenis 6 teamoj kun po dek biletoj kaj je la fino ĉiuj gajnis belan ludilon, alveninta ĝustatempe en granda paketo."

"<u>Ni daŭrigas</u> aktivi en la konstrulaboroj. Dum la pasintaj semajnoj laboris ĉiutage inter 7 - 10 viroj, metante la tegmenton sur la metilernejon, la kahelojn en la granda verando, konstruante ŝtuparon antaŭ la nova domo, munti novajn tubojn por konduki akvon k.t.p.

Por solvi ĉiutagajn problemojn, ekzemple ripari barilojn kaj ŝtalojn, kapti ĉevalojn aŭ eskapitajn bovojn kaj porkojn, por komplikaj dom- kaj ĝardenlaboroj troviĝas nur ŝporade helpantoj."

"<u>3 bovidoj naskiĝis ĉijare</u>," daŭrigas Ursula. "Venontjare ni nepre devos kontrui novan, fortikan ŝtalon. La nuna datas jam de 1979 kaj ĝi estas el ligno, kiel ĉiuj ĝis nun. Dum la pluvsezonoj ili tro suferas kaj ĉiujare ni riparas aŭ novigas. Nun ni volas fari ion definitivan. Ni kontruos ŝtalon el cemento kaj brikoj, kiu esperable daŭros la venontajn 30 jarojn

Die '<u>Woche des Kindes</u>' wird en BE immer ganz besonders herausgehoben aus den 52 normalen. Morgens ist, wie üblich, Schule aber nachmittags wird gespielt und gefeiert, mit und ohne Nachbar-Kinder. Giuseppe hat ein großartiges Spiel "Schatzsuche' erfunden, an dem 6 Gruppen teilnehmen und schwierige Aufgaben gelöst werden müssen. Aber alle bekommen zum Schluß einen Preis. In diesem Jahr kam gerade rechtzeitig ein großes Paket mit Spielzeug an.

"<u>Die Bauerei geht weiter!</u> In den letzten Wochen waren täglich 7 - 10 Arbeiter hier, die das Dach der Berufsschule gedeckt, die große Veranda gefliest und die Treppe für das neue Haus gemauert haben. Außerdem mußten neue Wasserrohre gelegt und noch manche anderen Montagearbeiten ausgeführt werden. Für den täglichen Kleinkram, wie Flicken der Zäune, Reparieren der Ställe, Einfangen von Pferden, ausgebrochenen Kühen und Schweinen, die schwierigen Haus- und Gartenarbeiten u.s.w. finden wir immer nur sporadisch Helfer."

---

Resp.: Margret Brandenburg
Brinker Damm 24
D-4404 TELGTE

Nova ŝtalo necesas kaj ankaŭ eblas financi ĝin. Tamen, ni devas okaze pripensi, kiujn grandajn, novajn investojn kunfinancu nia societo. Ni plene fidas la decidojn de la estraro en BE, sed ni konas la limojn de nia buĝeto. Eble ni povas ankoraŭ motivigi kelkajn bonvolulojn pli - inter la esperantistoj ili estas pli dense semitaj - eble eĉ inter niaj samnacianoj, amikoj, estus potencaj subtenantoj. Provizore restas tamen la pli-malpli 20.000,- kaj la konsekvenco fari liston de prioritatoj, malfacile farebla je distanco de 11.000 km. Mi esperas, post mia unua vizito en BE venontan februaron, prezenti al vi tian liston, kiun ni tiam diskutu skribe aŭ buŝe.

Membroj kaj subtenantoj, kiuj ankoraŭ ne ricevis kvitancon por pagoj en 1988 trovas ĝin aldone. Por kromaj pagoj, ĝis la 31.12.1988, ni sendas komprenebIe kvitancon por 1988, se vi tion deziras.

Ni dankas ĉiujn, kiuj ankaŭ ĉijare diversmaniere subtenis BONAN ESPERON: La sendintojn de la multaj paketoj, la helpantojn el Eŭropo, kiuj oferis monon kaj certan tempon por efike kunlabori en BE kaj la aron da subtenantoj, kiuj finance ebligis progresojn.

"8 Kälber sind in diesem Jahr geboren," schreibt Ursula weiter. "Im nächsten Jahr brauchen wir unbedingt einen neuen, soliden Stall. Der jetzige ist von 1979, aus Holz, wie bisher alle Unterstände. In der Regenzeit haben sie zuviel auszuhalten und dauernd muß wieder repariert oder erneuert werden. Jetzt machen wir Nägel mit Köpfen, d.h. wir bauen einen Stall aus Zement und Steinen, der hoffentlich dann 30 Jahre hält."

Ein neuer Stall ist wichtig und auch wohl zu finanzieren. Wir müssen aber auch einmal überlegen, welche neuen, größeren Investitionen von unserem Verein mitgetragen werden sollen. Solche Entscheidungen können sicher nicht auf Dauer aus 11.000 km Entfernung richtig beurteilt werden. Ich hoffe deshalb, nach meinem ersten Besuch in BE, im Februar 1989, eine Prioritätenliste aufstellen zu können, die wir dann schriftlich oder mündlich diskutieren.

Diesem Rundbrief liegt die Spendenquittung für 1988 bei! wenn Sie sie noch nicht bekommen haben. Bitte schreiben Sie uns, wenn etwas nicht stimmt. Sie können natürlich noch gerne bis zum Jahresende auf ein Konto von BE einzahlen und bekommen, auf Wunsch, auch die Quittung für 1988.

Wir danken allen, die sich auch in diesem Jahr durch vielfältige Unterstützung für BE eingesetzt haben: mit vielen Paketen, die umsichtig verpackt und mit großem finanziellen Aufwand verschickt wurden, als Helfer aus Europa, die Zeit und Geld investiert haben, um in BE mit anzupacken und den vielen Spendern, die das Anpacken erst ermöglicht haben.



Pli- malpli arte ili ornamas la du malantaŭajn murojn de la lernejo!
Mit viel Talent werden die beiden hinteren Wände der Schule bemalt

